


el Muhlberg Kolegio:



Ten-Bulteno



Novembro-
Decembro
1965

SEG

JEN - BULTENO

Organa de la Junularo Esperantista de
Nord-Ameriko Novembro-Decembero 1965

MUHLENBERGA OFICISTARO:

Redaktoro: Joseph F. Conroy
Vicredaktoro: M. Elizabeth Alexander
Materiala Sekretarino: Lauren Kelley
Ceftajpistino: Deanne Christiansen
Amhara Komisiito: Alemayehu Indeshaw
Konsilisto: D-ro Rodney E. Ring

Bonvolu sendi kotizejn al: Stanley F. Cohen, 16 Long Ave.
Allston, Mass. 02134

Bonvolu sendi materialon
por la Bulteno al:

Humphrey Tonkin, 7 Linnean St.
Apt. 6 Cambridge, Mass 02138

ESTARO DE JEN:

Pat Shell
Stanley F. Cohen
Humphrey Tonkin
Jim Craighead
Ann Bodins
Judy Lapenas

REPRESENTANTOJ AL JEN:

Arthur Morse .. Okrid. Mass.
Naomi Sabghir.. Univers de Md.
Jim Craighead..Long Beach Kal.
Pat Spaeth.....San Diego
Nelly Perez Yip. Portoriko
Fred Shell.....U.de Kal., Berk.
D-ro Rodney Ring..Muhlenberg

JEN petas ke ĉiu alia junulara Esperanto-grupo sur loka aŭ
lerneja nivelo elektus unu el siaj membroj kiel oficialan
representanton al JEN. Sendu la nomon al la Sekretario, kaj
ankaŭ ĉiujn generalajn komunikojn:

Pat Shell, 2535 Hillegass #6, Berkeley, Kalif. 94705.

ETIKETACO

de S-rino Roth
(nia Emily Post)

Mi ne rekomendas praktiki fromaĝon mangadon per tranĉilo kaj forko en dekstra mano kaj kulero kaj vinglaso en la alia; estas speco de mallertemeco en la funkciado kiu ne kvanto de praktiko povas tute dispeli.

Ĉiam sin permesas peti artiŝokan geletanon kiam oni mangas meleagron, tamen estas domoj kiuj ne provisas.

DENSIGITA RAKONTO

de D-ro Anna Ziegler

LUMO de Frisman kaj Suckever, Israelo.

Infano deziras eternan lumon por si kaj por la tuta mondo. Ŝia patrino iris al la kruĉ-vojoj de la mondo kvar foje, serĉanta lumon. Ŝi estis preta doni ĉion kiun ŝi posedis ke la filo havus lumon. Ŝi auskultis maljunajn saĝulojn kaj ili diris ke ŝi devus labori per ŝiaj okuloj, manoj, kaj koro. Ŝi devus kolekti la saĝajn kaj sciencajn librojn kaj transdonas ilin al ŝia filo.

Nur la saĝaj kaj sciencaj libroj donos lumon al knabo, kaj kiu lernos el ili, sed ne por la ekstera mondo. La knabo estiĝos malfeliĉa maljunulo kiu serĉas lumon por la tuta mondo.

Lia lasta tago venos, kaj tiam li komprenos la mondan leĝon: Kiu serĉas la lumon havos lumon, sed nur por si mem, ne por la tuta mondo. Necesas ke ĉiuj serĉas sian propran lumon.

ĜOJAN HANAKASOLSTICOKRISTNASKTAGFESTON!!!

KAJ

PLENOKAZAN NOVJARON!!!

"NEO" LA PLEJ NOVA LINGVO INTERNACIA
el Bruselo (AP)

de Johnny Swaelens

La plej juna de la kvin "aktivaj" lingvoj internaciaj, Neo, progresadas ŝatige, pretendas sia iniciatisto, Arturo Alfandari. La kvar aliaj lingvoj nun uzata estas Esperanto (la plej konata), Ido, Occidental, kaj Interlingua, aldonas li.

Alfandari diris ke li studis en "L'Istituto Superiore di Comercio di Venezia" li estis sekreta-kodisto en la Itala armeo dum la Unua Monda Milito, kaj elmigris al Belgujo pli ol tridek ok jaroj antaŭe.

Aldonas ke ĉiam li estis ensorĉita de lingvaj problemoj, kaj en mil naŭcent tridek ses publikigis "libron" kiu diras antaŭe tiun kiu Neo nun similas.

—Neo naskiĝis el miaj rimarkoj de aliaj lingvoj, diris li, kaj ankoraŭ evolvas en la direkto al ebla fina perfekteco. Mi komencis imagi ĝin kiam mi rimarkis la malfacilecon de tradukanto el aliaj lingvoj en Esperanton.

Alfandari klarigis ke estis laboreco tre malfacila kiam li preparis la unuan oficialan tradukon de Neo, eldonita en mil naŭcent sesdek unu. —Mi devis meti en alfabetan rangon pli ol sepdek mil vortoj por ĉi tiu vortaro-gramatiklibro kiu sin etendis trans mil tricent da paĝoj de maldika papero.

Nune, Alfandari preparas pli mallongajn Neo-lernlibrojn por tiuj kiuj parolas aliajn lingvojn ol la franca.

La unua vortaro-gramatiklibro kaj la "Rapida Neo-Metodo" estis ambau publikigitaj france, kaj baldaŭ, Alfandari anoncis, simila densigita Neo-metodo estos angle kaj estos sekvida, supozanta sukceson, de similaj lernlibroj alilingve



PRI MUHLENBERG:

Longe antaŭ la revolucia milito, venis al Ameriko el Germanujo pastro luterana, kiu nomiĝis Henry Melchoir Muhlenberg. Li fariĝis patriarko de granda familio amerika kaj la prapatro de longa vico da homoj brilantaj.

Frederick Muhlenberg, filo, estis la unua ĉef-parolisto de la Reprezentarejo en la nova lando. Alia filo, Peter, fariĝis generalo en la revolucia armeo; kaj la tria filo gajnas famon tiel botanikisto.

Devenulo el la familio, alia Frederick fariĝis la unua prezidanto de la kolegio nomigata "Muhlenberg". Li estis profesoro de la greka lingvo kaj venis al Allentown por konduki la novan institucion.

Oficiale fondita en 1848, ĝi estis nomita "Allentown Seminario", sed ŝanĝis la nomon poste al "Muhlenberg College". Dum pli ol cent jaroj, registriĝis nur vir-seksaj studentoj, sed nun de 1957, ankaŭ studentinoj registriĝas.

La kolegio estas plenakreditita institucio de "Liberaj artoj", kiu al-jugas diplomojn al gestudentoj kiuj sin preparas por enĝenierado, arbarkulturo, medicino, juro, kaj teologio, ktp. Konsistas la fakultato de pli ol 110 geprofesoroj, kaj sesdek procentoj estas doktoroj. La nuna prezidanto estas konata atoma fizikisto. La ĉirkaŭe 1400 gestudentoj ŝatas dabati kaj spiras liberan aeron en atmosfero de konceptoj kaj ideoj. Ili zorgas pri la menso sed ne endoktrinigas. Kiam mond-famaj personoj venas kaj parolas, ili libere kritikiĝas (tiel la anoj de la fakultato) kaj ĉiuj personoj kaj ideoj taksigas ĉiam. Ni fierigas nin ĉi tie ke ni nur disciplinigas sed edukigas mense.

Esperanto venis al la Muhlenberga kampo en la aŭtuno de 1964 en forma de senkreditaj Esperantaj klasoj por komencantoj, kiuj sin kolektis fine en klubo. Do nia klubo, redaktoro de ĉi tiu JEN Bulteno, estas juna membro de la kampa familio. Juna, sed tre aktiva, ĉar la klubo prezentis jam kelkajn originalajn Esperantajn mok-verkojn (unu en Novjorko), festojn, kaj kunajn kunvenojn.

Estis plezuro al ni helpi JEN eldoni la Bultenon kaj ni esperas ke al vi plaĉos.

SU TANG HON - RECEPTO FILIPINA

de S-rino Mae Villamor de Filadelfio

Por mangi kiel filipina reĝo, sekvu ĉi tiujn simplajn regulojn:


Ingrediencaro:

- 2 pakajoj da Su Tang Hon riza "noodles"
- 2 kokinaj brustoj.
- 1 celeriaro.
- 2 verdaj piproj.
- 1 cepo.
- 1 granda metalujo da tomata pureo.
- Sauco de la soja fabo.

Metodo:

1. Kuiru la kokinon ĝis estas blanka la viando.
2. Kokino kuirita, enpotigu ĝin kun hakita celeriaro, cepo, kaj pipro.
3. Kuiru ĝis estas iom mola, la tutaj, kaj aldonu tomatan pureon, sojan saŭcon, kaj sufiĉan akvon por saŭcon fari.
4. Kuiru malrapide ĝis $\frac{1}{2}$ horo.
5. Aldonu "noodles" boligu, kaj ne kuiru plu. Lasu ĝin sidu iom da tempo. Servu kun rizo kaj rido!

Ĝoja Mangado!



LA PENSILVANAJ GERMANOJ

de D-ro Rodney E. Ring

Pensilvanio havas multajn mirindaĵojn, sed fariĝis vere unika pro posedaĵo homa: la "pensilvania duĉ". Tiu ĉi nomo estas, tamen, aliigajo, ĉar ili ne eliras el Nederlando. La nomo elvenas el la germana vorto "Deutsch", kaj ili ja estas germanuloj. Du apartaj specoj sin trovas en Pensilvanio: la gajaj kaj la simplaj.

Kiam oni vizitas la sudorientan parton de la ŝtato, oni vidas tuj ke malsimila estas la enloĝantaro ol la aliaj de Usono. Eĉ la kampoj ŝajnas strangaj kaj la farmtenejoj havas grandajn multfarbajn ensorĉsignojn. Sur la domoj, kiuj estas konstruataj kutime per ŝtonoj el la kampo, estas ŝindoj de ardezo. La pontoj donas ankaŭ ĉarmon al la regiono, ĉar estas kovritaj kaj tegitaj tiel ŝirmo komplete kontraŭ la vetero.

Kiam oni aŭdas interparoladon inter ili, ne nur inter farmistoj, sed ankaŭ en la urboj inter diversistoj, oni aŭdas veran germanan dialekton! Infanoj ofte ne povas kompreni la anglan lingvon, kvankam siaj geavoj naskiĝis en la ŝtato, eĉ en la sama farmbiendomo! Kaj la plejparto de la popolo parolas angle kun forta fremdprononcmalmaniero.

La kamparanoj kiuj nomiĝas "simplaj" estas anoj de kristana sekto. Ili ne havas konsekritajn aŭ ekleziojn grandajn, sed vivas religie kaj konservas la fasonojn, vivmodojn, ktp., de la dekoka kaj deknaŭa jarcentoj. Ili malofte modifas la vivtradiciojn kaj ŝajnas esti la samaj tiel la gepatroj sendeviado! Ili plugas ankoraŭ per ĉevaloj kaj havas domojn sen necesejoj. Se ili aĉetas domojn, kiuj enhavas plumbajon, ili tuj eltiras defluejon, drenilon, kun tubaroj, kaj eltiras ankaŭ telefonon, televidon, kaj tutajn dratojn kaj metalfadenarojn. Kvankam senelktro, la domoj estas ĉarmaj kaj enloĝeblaj, sed certe ne-modernaj.

Lulseĝoj kaj balancseĝoj staras sur la portiko, en la kuirejo, kaj ofte en la salono. Ili havas antikvaĵojn por uzi ĉiutage! Murhorloĝojn belegajn oni vidas ĉiam.

La ŝtona grundo fariĝas prospera per laboro, ĉar ili estas tre laboremaj farmistoj. Plantado kaj rikolto estas "per la signoj de la zodiako." Ili estas ankaŭ purigemaj kaj sparemoj. Oni ne trovas malriĉecon inter ili. La viruloj kreskiĝas grandaj kaj fortaj, sed ne parolas blasfemon. Preskaŭ neniam ekzistas drinkulo en la grupo.

Kvankam oni diras ke la terkulturisto kiu havas knabinon por amindumado faras ĉiam pordegan bluan por montri ĝin al la knabaro, oni ne devas kredi la rakonton. Estas same tiel la rakontoj pri

(Pensilvanaj Germanaj)

sorĉistinoj kun ensorĉprezentoj por geaminduloj, kaj la geavoj kiuj permesas lito-amindumadon! Eble ne ekzistas. Ni scias ke la ek-sedziĝo ne okazas, kaj la "simplaj" estas moralaj homoj.

Pli ĉarman vestaĵon oni ne vidas iel! La simplaj virinoj portas kufojn sur la kapo kaj malnovan fasonon de frakoj nigraj. La butono-ŝuoj estas altaj kun preskaŭ ne-videblaj ŝtrumpaĵoj supere. Estas multaj butonoj, hokoj, kaj agrafoj; kaj la fraŭlinoj ne ŝangas.

La viroj portas ĉapelojn kun larĝaj rundaĵoj. Ili havas lip-harojn kaj vangoharojn. La supervesto blua kun ŝultro-rimeno portiĝas kiam ili iras al publika vendo, kiun ili ŝatas. La aŭkcioj publikaj okazas ofte, kaj ili aĉetas objektaĵojn multajn, kiujn ili donas al la geknaboj por porti al la kabrioletoj. La geknaboj havas la saman aspekton tiel la gepatroj (nur pli-malgrandaj) kaj kun nudaj piedoj ili kuras al la kabrioletoj.

Kompreneble ili ne veturigas la aŭtomobilojn. La ĉevaloj staras antaŭ la kabrioletoj en longaj vicoj kaj oni ne scias kiel ili povas trovi la ĝustan kabrioleton inter la samaj nigraj kvadrataj skatoloj! Ili ne ŝajnas havi ajn diferencon, sed la geknaboj trovas ilin.

Sed la "gajaj germanoj" de la regiono ne estas samaj. Ili ne vivas simile iel, krom pro la dialekto germana. La gajaj parolas la saman dialekton sed kun multaj blasphem-frazoj. La vizitantoj en la distriktoj orientaj de la ŝtato ofte embarasigas kiam ili aŭdas eĉ la knaboj-paroladon. Sed ĉi tiu verkisto scias ke ili ne estas malbonaj personoj. Ili havas korojn kiel puraj tiel la neĝo. Ili ne deziras malhelpi iun, kaj bon-amikiĝas. Ili ne estas anoj de kristiana sekto, sed amiĝas al diversaj eklezioj aŭ al nenio.

La gajaj germanoj loĝas en la urboj kaj laboras ĉie. Ili parolas la anglan lingvon sen forta prononcmanniero, sed alie ne estas distingebla el la aliaj enloĝantoj de Pensilvanio. Ili tre gojas festojn, kaj ŝatas trinkegadon kaj manĝegadon! Malofte siaj festoj fariĝas orgioj.

Travibron en vivado havas la gajaj germanoj; la feliĉeco kaj raŭto de ili estas el kora amikeco.

Mi Havas Amikinon

au

Kiun Unu Monato Esperanta Povas Fari

Kiam mi unue lernis Esperanton, mi havis grandegon timor. Ne volis mi diri au skribi ion ajn ĉar mi sciis ke mi kredeble dirus la kontraŭon de kiu mi intensis. Sed mi recevis leteron de la Popolo al Popolo organizaĵo. Ili volas ke mi al iu en eksterlando-ĉe iu malantaŭ la fera kurtejo! Mia timo kreskegis. Kio okazus se mi dirus iun erare? La eksterlandan administra-systemon ruinigus mi. Milito povus resulti. Mi petis mian Esperantan kluban konsiliston por helpo. Mi diris, "S-ro. Rondo, mi 'vantigas' helpon." Diras li, "Kio? Vi estas vanta. Vi intendis diri 'volas'! Vi ja bezonas helpon." Li donis al mi multan konsilon. Fine diris li, "Vi estas preta. Havu koragon. Skribu!"

Do mi skribis mian unuan Edperantan leteron al knabino en Bulgario. La vortaro kaj mi skribis ĉi tiunleteron. Ĝi estis laboro de arto. Sed mi eltrovis ke ĝi ĝojigis min! Post nur unu monato de Esperanto mi povis verki ioman inteligentan. Tamen kun timo kaj tremo mi postigis tiun leteron kaj maltrankvile atendis la respondon.

Nur unu semajno poste mi ricevis ĝin. Estis kora, longa letero pri Vasili mem, ŝia familio, intereso, kaj laborado. Kune sendis ŝi manokoloritan lignan pinglon. Mi estis ekstazegita! Nun ŝi kaj mi intersangas ofte leterojn, multajn kartojn, revuojn, kaj juveletojn.

Vi elkomprenas, tamen, ke ŝi ne konas ion Anglan kaj mi (bona Pensilvana Germanino) certe ne scias vorton Bulgaran. Tamen ŝi kaj mi komprenas ĉiu alion. Estas mirinda.

Mankas al ni en la Esperanta movado junulara en Usono, ke ni ne skribas sufiĉajn leterojn al eksterlando. Kuragu kun mi! Ankaŭ skribu!

Sendu por informo al:

People to People
2401 Grand Ave,
Kansas City, Missouri 64111

de Elizabeth Alexander


ESPERANTO MARŝAS

(laŭ la batala himno de la Respubliko)

Ĉu vi pensas ke la mondo
kuras frue al la fin'?
Ĉu vi kredas ke homaro
bezonegas medicin'?
Ĉu vi vidas inter homoj
por detrujo la inklin'?
Do estu ĝoja nun!



Esperanto ĉiam marŝas,
Esperanto ĉiam marŝas,
Ĝi iras antaŭ ni!



Esperanto jam rompigis do
la lingvan barier'
Kaj ĝi donis al la homo
novan vivon kaj esper'
Garantias sendubete
grandan pacon sur la ter'
Se oni uzas ĝin!



Verkita de D-ro Rodney Ring.

Rakonteto de D-ro Helen Adolf, Germana Profesoro

Dum ŝi vizitis en eŭropa museo, usonanino demandis:
—Kiam da jaroj havis Moseo kiam li staris por
pentriĝi de Mikelangelo?



Estis foje du rabenoj, Samaj kaj Hilel, kiuj sin batalis pri la fundamentaĵoj de Judismo. Samaj pensis ke la plej gravaj aferoj estis la ritaro, sed Hilel ke estis la agadoj.

Kaj en tiu sama regiono estis malsagulo kiu eniris en la oficejo de rabeno Samaj, kaj diris al li: --Rabeno, staru sur unu piedo kaj ripetu ĉiujn fundamentaĵojn de la Judismo. Kaj la rabeno diris: --Eliru rapide, malsagulo! kaj elirigis lin.

Do, la malsagulo venis al la oficejo de rabeno Hilel kaj eniris. Li diris la saman al Hilel, sekve de kio Hilel staris sur unu piedo kaj diris: --Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta forto; kaj amu vian nejboron kiel vi amas vin -- la tuta resto estas subnotoj!

Rakontita de Philip Schneider

PACO

de Elizabeth Alexander

Ora arbaro, kovrita ponto,
Kamparo tumulta per farbo,
Homoj vivantaj la belecon de ĉi tiu tago.
El alte en ĉi tiu autuna monato
Bona kaj felica estas la mondo
Tiel estas mi, perdita en eternaj pensadoj

"Hajkuo"

Suntramonton atendanta,

sentas la skribontan estonton.

de Elizabeth Alexander


LA BIBLIA PAĜO

I. Malnova Testamento ;



"Moseo ricevis la tabuletojn"

II. Nova Testamento ;



"Kaj Stefano ŝtoniĝis"

LA AMIKO DE LA LEONO DE JUDEO

Kvankam la Amhara estas unu el multaj diversaj lingvoj parolitaj en Etiopio, ĉi tiu posedas nekompareblan rangon en la reĝolando ĉar estas la lingvo oficiala de la regno.

Estas tre intima amiko de la "Leono de Judeo" (Hajle Selasi), kaj iras kun li ĉie. Liaj tutaj servistoj, civilaj kaj militaj, ĝin parolas kun ne paralelita fiero, kvankam al ili mankas la ĉarmo kaj grandeco, kiujn la lingvo spertas parolita de la "Leono", kiu estas, tiel parolanta, ĝia plena enkorpeco kaj la simbolo de ĝia eleganteco.

Krom estanta la oficiala Etiopa lingvo, Amhara estas ankaŭ la veturilo de la nuna sekulara literaturo, kaj lingvo postulita en la publikaj lernejoj. La Angla lingvo, nuna instruada lingvo, elvelkas pro la entuziasmo per kiu la Etiopaj studentoj lernas Amharan.

La Kopta Eklezio, kies lingvo estas la ĉefa rivalo de Amhara, cedas iom post iom al la superanta vento de la popola lingvo.

Kiel lingvo, Amhara povas sin fanfaroni multe. Posedas indigenan alfabeton de tridek kvar literoj, ĉiu de kiu sin trovas en ses silabaj formoj korespondantaj al la vokalaj sonoj. La alfabeto estas tute tra fonetika, do tre intima amiko de Esperanto.

Amhara entenas sian propran gramatikan aranĝon, kiu povas tikligigi la inteligentan studenton. Al siaj studentoj havas la Amhara la aspekton kaj de vakso kaj de oro. La vakso estanta la kiu estas memevidenta kaj kiun oni ne devas signifklarigi, kiel gramatikaj reguloj aŭ formuloj. Kaj la oro estanta la kiu penvalorigas la plilongitan studon de Amhara, kiel la kaŝita signifo, aŭ la lerta frazturnanto.

Kamparaj sinjoroj, kiom edukitaj tiom ili estas, malofte uzas pli ol la vaksa parto de la lingvo, ĉar ili ankaŭ estas simplaj kaj malkaŝemaj. Sed, alie mane, enigas la poetoj kaj verkistoj la orajn sonojn de Amhara ĝis la kvar anguloj de la regno.

Vere, Amhara estas alia senmorta reĝino en la lando de la Reĝino de Seba, kaj bonkaŭze: havas sian propran fieron, la benecojn de la "Leono de Judeo", kaj de la tuta popolo; kaj la animo de la nacio loĝas en ĝi kaj iras el ĝi nature.

de Alemajehu Indesau,

Etiopa Studento
ĉe Muhlenberg.

MEMORO:

de Joseph Conroy

Kiam ni marŝis tra la sunbrilaj kampoj,
La floroj laŭtigis siaj bonodorajn voĉojn
gis goja kanto,
Kaj la sovaĝaj bestoj gojigis kun ni.
Kune, ni forpuŝis la rigidajn murojn de vivo
Por vidi la floritajn horizontojn,
Kaj ekprenis la direkton de la Estonteco,
Por ĝin formi goje.

Kvitita de la malliberejo antaŭ ol finiĝis
sua mateno,
Ŝi lasis min poste, atendanta en amasa solejo.

LA "HAJKUO"

de Joseph Conroy

Poploj klinantaj per la vento
tiel Islamaj preĝantoj.

Nescio
estas insulo;
Scio,
la sama elserĉanta.



POEZIACO:

el Latina de D-ro Rodney Ring

Knabino Nigera ridis
Kiam sur dorso de tigro ŝi sidis,
Foriris eksterne,
Revenis interne,
Kaj ridi kun tigro nun restis.

ESPERANTO KAJ LA LUDEJO

de Joseph Conroy

Meze de malriĉa parto de Filadelfio estas malgranda ludejo kiu ne estas tre bela, sed nek ankau estas bela la ĉirkaŭaĵo. En la limo de sia grundo, apenaŭ kovrita per malglata herbo, staras konstruaĵeto de du ĉambroj. En ĉi tiu konstruaĵo, inter ĉi tiuj malpuregaj ĉirkaŭaĵoj, kie la batalo por vivi estas la unua afero, kie la instruadeco estas severe utila, sed malgraŭe malsufiĉa, ĉi tie venis la granda idealo, la lingvo internacia, Esperanto.

Aro de amikoj kaj mi fondis la "Kondakal Rorla" (Fondacio de la Serĉadistoj), kaj administris la ludejon laŭ bazo malregulara dum pluraj jaroj. La pasinta somero, tamen, ni decidis pligrandigi niajn funkciadojn tie kaj proponi programon konsekvenca. Kiel programa direktanto, Esperantisto, kiel ankau aliĝinto al ideo ke dua lingvo ofte helpas tiujn kiuj havas malfacilecon en la unua, sekvis nature ke ni sekvus korson laŭ lingvo orientitan.

Do, kiam ni frontis kontraŭ niaj amiketoj je tiu unua mateno, ni estis prezentontaj al ili ion tutan eksteran de sia normala sfero de agado. Ne estis longa tempo ĝis ili faris grandan ŝuton el Esperanto, kaj uzis ĝin kiel "nia sekreta lingvo" konita sole de tiuj kiuj venis al la ludejo laŭ rutino (ĉirkaŭ dudek geknaboj) kaj okmiliono da aliaj Esperantistoj.

Kompreneble, ni instruis Esperanton per minimuma aludo al aŭ skribita gramatiklibro aŭ gramatikaj terminoj. Ili lernis ĝin kiel lernis la Anglan - parolante.

La neŭtraleco de la lingvo internacia servis kiel bonega vetruilo per prezenti tiujn geknabojn al la mondo da kulturoj kiuj atendas ilin. Ni povis per la Esperanta ilo, prezenti al ili multajn kutimojn elprenitaj el siaj fremdaj kunteksto, kaj metitaj en la Esperanta mondkulturo. Israela "Hora" iĝis dancon inter dancoj; "Ĉau mejn" iĝis ion kiun ni mangis nature; mem Esperanto iĝis ion kiun ni parolis el pura goĵo. Imagu kiel plaĉitaj ili estos, tiuj geknaboj kiam ili trovos ke havas nun ion en komuna kun la Israeloj, Ĉinoj, kaj milionoj da Esperantistoj!



Ne, ni ne festas je la
festago de Columbo.



La leĝiga komisiono faris
studon. Se vi malkapabigus, la
aferoj irus ordinaraj.

"Hajkuo"

Kuru al la rond'domo,
li ne enanguligas vin tie!
(el malnova kanto - J. Conroy)

NOVAJ VORTOJ

de Joseph Conroy

Ĉiu de ni skribis en la vojaĝlibro de nia vivo
Mil diversajn memorojn de tempo aparte pasinta diverse.
Tamen, ni staru kaj rigardu nin,
Ripozantaj en la varmo,
Pikvibrantaj per la ekscito,
De intemeco,
Antaŭ ol rompos novaj vortoj la fadenon de komuna ĝojo.

(verkita laŭ la pensado de kolegia reveno aŭtune)

KIO ESTAS DIO:

de Joseph Conroy

Kio estas Dio aŭ kiu povas Dion kompreni?
Ĉu Dio estas bona aŭ malbona?
Kiu scias aŭ kiu povas scii?
Jen neniu.
Dio ne estas videbla okule, nek aŭdebla orele,
nek tuŝebla mane;
Sed estas videbla, aŭdebla, tuŝebla anime.
Jen Dio la Eternulo, la Plejaltulo, kiu estas
malkomprenebla inter la popoloj.

Jen mi, meze de miaj kampoj, antaŭ la pluvo.
Jen mi, ĉe mi, inter mia familio, antaŭ la kameno.
Ĉu mi ne plaĉas al Dio, mi la homo marsanta tra
la kampoj, inter la landoj, mi la ido de Dio?

NOVAĴOJ:

SANGO DE ADVIZO:

La Komunista reĝimo de la Orienta Germanujo reakceptis la ilon de Esperanto tiel lingvo internacia kiun ĝi antaŭe kondamnis tiel "malbonega kosmopolitana produkto de la Imperialistoj."

Opinion jam ŝanĝis la Komunista Kultura Federacio kaj fondis la centran studon grupon de Esperanto. La Komunista reĝimo, kiu batalas por internacia rekonado, volas fari kontaktojn kun Esperantaj Federacioj en Eŭropo kaj en Usono. el ĵurnalo Times-Picayune.

VORTARO:

La mondfama germana infan-vortaro "Kinderduden" (Bibliographisches Institut, Mannheim, Dudenverlag) aperos baldaŭ en Esperanta formo! Spertuloj en multaj landoj helpas, kaj la Esperanta presilo en Toronto vendos je malaltigitaj prezoj por praeksempleroj laŭ Cathy Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, Calif., 94010.

POŝTKARTOJ:

Ekspozicio en Calais, Francujo, bezonas poŝtkartojn ilustritajn de la ĉef-urbo de ĉiuj landoj. Skribu al 178 Chemin Castre, 62 Calais, kaj vi ricevos respondon ilustritan.

INFORMILO: "The Educational Value of Esperanto Teaching in the Schools" estas nun havebla! Farita kaj verkita de la UEA per Raif Markarian (Doc B/1/2), ĝi estas tre-ege bonega!

LA NUNA KONVERSACIAĴO

Anstataŭ diri: —Ĉu vi pensas ke la pluvo difektivigos la rabarbon?, oni devas diri: —Kie vi estis kiam la urbo mal-lumis?

LOKO

de D-ro Minotte Chatfield,
Profesoro de la Angla lingvo


La certeco de morgaŭ estas la ebleco de hodiaŭ,
La certeco de morgaŭ kiel la hodiaŭa estinteco foriros baldaŭ,
Kaj jen ni ankoraŭ kun nia ebleco.




KOMENCANTINO PAROLAS

Kiel komencantino Esperantista, mi trovas la lingvon facila por lerni kaj tre utila. El antaŭaj spertoj je la franca, latina, kaj angla lingvoj, mi povas diri ke Esperanto, pro sia simpleco, estas la ideala elekto ĝis nivelo de lingvo internacia. La malmultaj reguloj gramatikaj faras ke oni povas iĝi kompetenta je vorta uzado post iomete da tempo. Ankaŭ, la vortareco estas facila ĉar multaj el la vortoj estas variadoj de anglaj vortoj kaj de aliaj familiaraj lingvoj.

Koneco de Esperanto donas ankaŭ bonan metodon por koniĝi kun novaj personoj de aliaj Esperantaj kluboj tra Usono kaj alilande. La Esperanta lingvo pro sia manko de malfacilaj gramatikaj terminoj estas vere la ideala solveco por la internacia lingva bariero.

de Lauren Kelley, nova Esperantisto.





APELON

La Dana Kampanjo kontraŭ Atom-armiloj agas laŭ la firma konvinko, ke komuna laboro per homaro en la tuta mondo kapablas forigi la minacon de ekstermigo de ĉia vivo sur nia terglobo.

Ni spertas pluan disigon de nukleaj armiloj al pliaj landoj kaj aliancoj. Ĉinio jam posedas proprajn nukle-armilojn, tiu Ĉinio, kiu kun sia 700-miliona loĝantaro ankoraŭ ne partoprenas en la malarmadaj intertraktoj, ĉar ĝi ne "ekzistas!" Oni jam parolas pri mult-latera atompotenco "oriente de Suez," kaj en Orienta eŭropo oni pritrakas starigon de atom-armilaj batalformacioj de NATO.

Okcidenta-eŭropaj batalformacioj nukle-armilaj signifos krome streĉigon de la kontrastoj inter Oriento kaj Okcidento: Oriento faros adekvatan aranĝon.

Ni apelas al ĉiuj homoj kunagi, por ke komuna eŭropa rezisto kontraŭ eŭropaj atomarmiloj kreigu. La orient-okcidentan konflikton oni malpliigu pere de intertraktoj kaj ne ĝin plifortigu pere de nukleaj armiloj. Nur tiamaniere Orienta kaj Okcidenta eŭropo povas kunhelpe montri la vojon al stabila mondsocio.




KRUCVORTLUDA TROVINDA FRAZARO:


HORIZONTALE:

1. infinitiva formo de la ne-definitiva sufikso.
2. dua persona pronomo.
3. la franca vorto "si" Esperante.
4. prefikso montranta grandan primitivecon.
5. virseksa ido de la samaj gepatroj.
6. post kvin.
7. kolekto da homoj kiuj rebonigas konstruaĵojn post ili disfalis.
8. adjektiva formo de la sufikso kiu esprimas kolekton da samspecaj (estuloj)
9. estigi ion aŭ plenumi agon.
10. poseda adjektivo resendanta al la gramatika subjekto de la propozicio.
11. havi bildojn aperantajn en nia imago dum dormo.

VERTIKALE:

1. vira ceremonia vesto.
2. prefikso montranta denovan venon aŭ ripeton.
3. havanta randon kiu estas tranĉa aŭ pika.
4. la finaj du literoj de nia kara lingvo.
5. tre bona.
6. dum li vivis, la profesoro _____.
7. signifas unu el la elementoj de tutaĵo.
8. en la direkto de la diablo.
9. kion oni faras kun rizpekto al ombrelo.
10. kiam vi ne eraras, vi _____.
11. membro.





Return postage
Guaranteed -
Stanley F. Cohen
16 Long Ave.
Allston, Mass.
02134

NEW DIMENSIONS
1960-1970
OFFICE OF DESIGN



ALLEN
D.N.
BR 174453
E 04